

Christian Morgenstern,

Tento

tradukita de Willy Nüesch

Mi ĉe abismo kun hezit'
 staris kaj diris, dum l' okul'
 rigardis sob: Ek, senmortul'!
 Necesas nur via decid'.

Ekdormos di', vekiĝos di', -
 vi diris mem. Ekdormu do!
 Ne estingiĝos la ego',
 ĉar nur la formon ŝanĝos vi...

- Ne ĉesis mia taglabor'.
 Se iu pekas per eksterm'
 de l' ŝel' antaŭ matur' de l' kern',
 tro frue dormas li - kaj hor'
 tro tarda vekos lin.

*Traduko de la Germana poemo "Versuchung" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-127-249 (2013-08-28 18:42:27)

La tradukinto Willy Nüesch (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.